

Chorus novæ Ierusalem

Brevier-Himno

Paska tempo > antaŭ Ĉieliro > matena laŭdo > laŭplaĉe post la paska oktavo labortage

*Chorus novæ Ierusalem
hymni novam dulcedinem
promat, colens cum sobriis
paschale festum gaudiis,*

*Quo Christus invictus leo,
dracone surgens obruto,
dum voce viva personat,
a morte functos excitat.*

*Quam devorarat improbus,
prædam refundit tartarus;
captivitate libera
Iesum sequuntur agmina.*

*Triumphat ille splendide
et dignus amplitudine,
soli polique patriam
unam facit rem publicam.*

*Ipsum canendo supplices
Regem precemur milites,
ut in suo clarissimo
nos ordinet palatio.*

*Esto perenne mentibus
paschale, Iesu, gaudium,
et nos renatos gratiæ
tuis triumphis aggrega.*

*Iesu, tibi sit gloria,
qui morte victa prænitens,
cum Patre et almo Spiritu,
in sempiterna sæcula.*

Amen.

Jerusalem', ho nova urb',
per novaj himnoj kantu vi
kun dolĉa son', el sobra kor',
en festa ĥor', kun paska ĝoj'.

Leono venkis kontraŭ drak',
kaj kontraŭ morto venkis viv'.
Mortintojn ĉiujn vokas Krist'
per klara voĉ' al Sia glori'.

Tartar' redoni devas nun
la predon, kiun glutis ĝi.
Kaj kiuj kaŭris en karcer'
liberaj sekvas al Jesu'.

Triumfas Li en Dia splendi',
glorinda tra la univers'.
La unu Dian Regnon Li
konstruas el ĉiel' kaj ter'.

Ni, legiar' de l' Dia Reĝ',
al Li sopiras kun kantad':
Palacon Sian faru Li
al ni patrujo por etern'.

Vi estu do por nia mens',
Jesu', ĉiama paska ĝoj'.
Vi naskis novaj nin el grac':
triumfi igu nin kun Vi.

Al Vi, Jesuo, estu glori',
post Via venko brilas Vi
kun Viaj Patro kaj Spirit',
tra ĉiuj tempo kaj eon'.

Amen.

latina T: Fulberto el Chartres († 1029)

E: Albrecht Kronenberger 2008